

# 東方呼聲 VOĈOJ EL ORIENTO

Aperas Ĉinmonate  
Adreso: P. O. Box 74,  
Fankcw, Ĉinio.

Indi idua jarabono: U\$0.40 aŭ 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.  
Kolektivaj jarabonoj (2 aŭ pli ol 2 abonoj per sama adreso k adresito): po U\$0.30 aŭ 3 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

B. U. Dung:

## KION POSTULAS LA ĈINA POPOLO?

(Speciale verkita por "Voĉoj el Oriento")

Ĉinoj estas pacamaj. "Honesto k pacemo", inter ĉinoj, estas laudataj kiel bonaj virtoj. La ideala mondo priskribita de Konfucio, kiu estas respektata kiel sanktulo en nia lando por pli ol 2,000 jaroj, estas ankaŭ tiu de "paco" Kion la Ĉinoj el ĉiuj socitavoloj esperas, sopiras, estas "mondpaco". Nur en paco, homoj povas sukcese konservi si vivon; nur en paco, homoj povas vivi trankvile k entrepreni senzorge; nur en paco, la vivo k kulturo povas disvolviĝi senĉese al la pli alta grado.

Kiel menciite, ĉinoj, estas homoj tre pacamaj, do, pro kio ĝuste en Ĉinio, dum lastaj cent jaroj, okazis pli ofte k pli forte malpacigoj, ol en la ceteraj partoj de la mondo?

Jen estas la kaŭzoj:

Antaŭ cent jaroj, Ĉinio karakterizis sin per pura feŭdisma socio; ekonomie, ĝi mastrumadis izolite k dependis de neniu. Tiam, en eŭropo, estis iloranta la kapitalismo, kiu serĉis ĉie merkaton k krudajn materiojn. Dum Ĉinio, posedanta vastan teritorion, multajn naturricaĵojn k grandnombran loĝantaron, en ekonomio estis postrestanta kun larĝa distanco kompare al la kapitalismaj landoj. La eŭropaj kapitalismaj landoj, helpate de militŝipoj k kanonegoj, difektis ĉiujn barilojn de Ĉinio, k alportis al ĝi varojn, grandskale produktitajn, bonajn en kvalito k malĉarajn en kosto. La grandskala importado de la fabrikitaj varoj, en intersanĝado de krudaj materialoj je malegala prezo kaŭzis al Ĉinio grandiozan eksporton de malmola mono. Sekve, la propra ekonomia sistemo de Ĉinio estis detruita, k la agrikulturado, subprofesioj de la vilaĝanoj k metiaj industrioj estis abrupte disfaligitaj. Alvenis akuta transformiĝo en ĉinan sociekonomion. La fremdaj kapitalismoj ekmonopolis ĉiujn pulsojn de ĉina ekonomio, ekspluatis superordinaran profiton k regis la tutan landon. Ĉio tio malhelpis al Ĉinio la disvolviĝon de enlanda kapitalisma mastrumado post la diserigo de ĝia malnova produkta maniero, k ĝenis la plibonigon de la vivnivelo de la vastaj ĉinaj popoloamasoj.

Plue la ĉinaj postrestantaj elementoj de la feŭdismo, kiuj limigis la evoluadon de ĉina ekonomio, ligiĝas kun la entrudiĝinta kapitalisma imperiismo k kune ekspluatis ĉinajn popolamasojn ĝisufoke.

La malpacigoj dum cent jaroj ĝuste respigis la emancipan batalon de ĉina popolo kontraŭ la duobla subpremado

de la kapitalisma imperiismo k postrestantaj feŭdismaj elementoj.

En la proceso de la emancipa movado de Ĉinio, kelkiuj intencis apogi sin al imperiismo k postrestantaj feŭdismaj elementoj por la progreso de la nacio; sed aliaj opiniis male, kredante ke Ĉinio liberigos nur se realiĝos la renverso de la imperiisma superregado k ĝisfunda elimino de la feŭdismaj elementoj. Tiuj du opinioj, ne nure estis antipodaj teorie, ankaŭ en praktika agado malakordis akre kiel fajro al akvo. Pro tio, inter la popolo, ekestis fendoj, koliaj, eĉ militoj civilaj. Ĉar la imperiismoj komploti kun ĉinaj feŭdismaj elementoj, kiuj pro la diverseco de la apogataj imperiismoj ofte konfliktis inter si. La rezulto estis seninterrompa civila militado inter la militistaroj dum la pasintaj 25 jaroj. Unuvorte, la militoj inter la antirevoluciaj tendencoj, k la militoj inter la revolucia k antirevoluciaj tendencoj, prezentas al ni ekzaktan bildon por klarigi la situacion.

Inter la imperiismoj, la japana imperiismo intencas alproprigi la tutan Ĉinion al si monopole. Je septembro 18 de 1931 ĝi ekokupis Manĉurion perforte. Post nelonge, ĝi sendis ekspedicion al Sanhajo, okupis Jehol provincon, starigis "aŭtonoman" regimon en orienta parto de Hopej provinco k specialan regimon en Hopej-Ĉahar provincoj. Paŝon al paŝo japana imperiismo realigis sian planon por konkeri la tutan Ĉinion. Tiu de ĉero de pereigo de nacio k raso minacas ĉiujn geidojn de la nacio. Rezulte de tio, parte degeliĝas k parte malakriĝas la diversaj kontraŭdiroj ekzistantaj en la lando. La grandioza unuigo de ĉiuj klasoj k tavoloj de Ĉinio, por rezisti la ofensivon de japana imperiismo, efektiviĝis depost la eksplodo de Lukoĉiao-konflikto.

En la milito de la lastaj 8 monatoj, Ĉinio ne estas en favora situacio. Sed la vekigo de la popolo, formigo de la unueca registaro k unueca armeo, jam estas al ni ne ignorebla rezulto. Nur se ni, tuta popolo, povas konservi nian unuecon kontinue, plibonigi daŭre la politikon, kompletigi k pligrandigi la armeon, alĝustigi la taktikon k strategion, sinmobilizi aktive k plene, k rezistbatalas ĝis la fino, certe la milito fariĝos favora al ni k ni forpelos finfine la japanan invadanton el Ĉinio.

En la daŭro de naciarevolucia milito antijapana, Ĉinio fariĝos poiome la lando sendependa k liberigos el la subpremado de diversaj imperiistoj; k

Degradigos Homaro, Se Ĝi La Brutecon Tolerus!

Japanaj militistoj en Ĉinio buĉis civilanojn, seksperfortis vi inojn k plenumis multajn aliajn krudaĵojn, kaŭzas grandan indignon ĉe la popolo. Oni riproĉis ke la japanoj traktis ĉinojn kiel brutojn. Sed ni konceptas male, ke tiaj konsternaj agoj de japanoj estas tute senhomecaj. Oni malfacile diferencigis ilin kun tiuj de la brutoj. Tial ni des pli konstatas, ke ne la japanaj militistoj trakti ĉinojn kiel brutojn, sed nur la japanoj mem fariĝas brutoj sangavidaĵaj. Pro tio ordinaraĵaj popolanoj, renkontite de ili tuj fariĝas viktimoj. Tio-ĉi estas komuna scio, indas neniam miro. Tiaj brutoj, sen ia ideo pri justo k bono, ĉiam kiel utiligas siajn venenajn k mortigajn ungojn kontraŭ la sendefenda popolo, nur por kontentigi sian brutecan instinkton. Konsekvence, la obeemaj civilanoj k virinoj en la de ili okupitaj regionoj suferas tro multe. Ili ankaŭ ne lasas la neŭtralajn naciojn senĝenaj ekster sia regado ekz. en la koncesiaj distriktoj en Sanhajo, se la okazo taŭgas.

Fariĝas nun Ĉinio la vagejo de tiaj brutoj. Tio povas esti katastrofo de Ĉinio k de la mondo, k samtempe estas ankaŭ katastrofo de Japanio!

Japanio estas lando civila. Kial el ĝi naskiĝas tiaj brutoj, estas la enigmo de la epoko. Ni ne povas rezoni ke la kaŭzo kuŝas en tio ke la venena ŝovenismo, kiu saturis penetre en la nervon de la militistoj, spontance nun reliefigas en la konduto kun la aspekto de origina bruteco. En la menso de tiaj spinitaj invalidoj firma opinias ke la Granda Japana Imperio estas la sola hegemonio super la tuta mondo, k la Granda Japana Armeo estas la absoluta reganto de la tuta homaro. Ĉiuj moralaj reguloj nur utilas por kateni la malfortulojn, k signifas nenion al la Granda Japana Armeo. Baze de tiu konvinko, la japanoj traktas logike homojn malhome, k seksperforto, rabo, masakro k vandalismo de ĝi estas nature ne malhonoraĵoj. Tio estas la nova etiko de japana militistaro, sekve ne estas diskutindaj pri la krudaĵoj k kruelaĵoj faritaj de japanaj soldatoj en nia lando.

Ankaŭ tiu ideo trovis eksperimentejon en la japanlando, kiel ekzemplon ni citas la freŝdatan konflikton en la parlamento. La konflikto okazis pro la pasigo de Nacia Mobiliza Leĝo, k kiel rezulton la gvidanto de Japana Sociala Amasa Partio, s-ro Abe, ricevis severan bastonobaton en sia loĝejo de dekoj da kanajloj, kiujn ekspedis la militistofaŝistoj. Poste la Partio deklaris: "La Partio jam decidis, ke pri la akcidento ĵus okazinta respondecas la nuna registaro k la Ministro de Interna Afero. Estas profunde bedaŭrinda, ke la estiminda ĉefo de Japana Sociala Amasa Partio suferis tian senkompatan traktacion..... En lastaj jaroj, senĉese en nia lando okazis fiagoj simile al tiu-ĉi

politike, la popolo ĝuos la demokratecon k liberon, k ĝia vivo ankaŭ plibonigos tagon post tago. Tiuj estas la postuloj de ĉinoj.

Por la sendependeco k suvereneco de la nacio, por demokratio k libero, por la feliĉa k nova Ĉinio, heroe batalas ĉina popolo nun!

—esperantigis E. TIBU



## EKSTERORDINARA TEMPO APERIGAS EKSTERORDINARAN PERSONNO

## 58-JARA VIRINO KIEL PARTIZANA GVIDANTO

Apenaŭ estas kredeble ke gvidanto de 20,000 partizanoj, kiuj kaŭzis al Japanoj multajn embarasojn laŭlonge de la norda parto de Peipin-Hankow Fervojo, estas iu maljunulino 58-jara, kun argentaj haroj, fortika kiel kverko. Ŝi povas pafi per du Mauser-pistoloj samtempe k trafas guste la celon.

Tamen fakto estas fakto, dubemuloj ankaŭ konvinkigis antaŭnelonge pro la alveno de ŝi mem al Hankow, miksiginta inter rifuĝantoj en plenigita vagono. Ŝia misio estas raporti al la aŭtoritatuloj en la registaro pri militaj aferoj k petas pri municio por ŝia armeo. Ŝia alveno eskapis la publikan atenton, sed je ŝia retroveturo post kelkaj tagoj multaj militaj komandantoj adiaŭis ŝin en la stacio. Ili ĉiuj staris en ĝentileco k salutis kiam ŝia trajno malrapide forglitis el la stacio.

La lasta memoro restanta por la akcidento. Nia lando, fronte al kriza cirkonstanco, bezonas gustatempe la grandan unuigon de tuta popolo por la akcelo de la milito kontraŭ Ĉinio, sed oni incitas per tiaj malhonoraĵoj la malpacigon en politika kampon enlande".

Antaŭe ni nur sciis, ke la brutan agon la japanaj militistoj aplikas ekskluzive en Ĉi io, sed nun Abe diris al ni ke ankaŭ japanan popolon ĝi trafis, k okazis "senĉese", k "respondekas nur la nuna registaro k Ministro de Interna Afero, Saccugu". Tio klarigas klare al ni, ke t.n. "Imperia Armeo", kune kun ĝia agente "Nuna Japania Registaro", kiamaniere atencas la malfortan najbaron ekstere, k premas sian samlandanon interne, kun nenia celo k ne demandante pri la metodo!

Ni kuraĝas firme konstati, ke kvankam la ekkrio de la Sociala Amasa Partio estas sufiĉe akra k forta, tamen ĝi nur tremas kiel helpkrio el la densejo de banditoj tra la meznokta silento, k sufokigos, tre baldaŭe post unu aŭ du vokoj. Ĉar la lando guste fariĝas la densejo de bandit-bando, kompreneble perforto k tiraheco ĉion regas. Tamen ni estas informita per la helpkrio pri la fakto ke en la densejo ekzistas multaj, kiuj superverŝas rekte aŭ malrekte sian abomenegon k antipation kontraŭ la tiraneco de la japanaj militistoj.

La senbrideco de la brutaro povas kaŭzi portempe teroron, sed tamen ĝi neniel kapablas transformi homaran mondon en la mondon plene de brutoj. Pri tio, ni havas firman konvinkon; en nia lando troviĝas ne malmultaj, kiuj ial pesimiste divenas pri la perspektivo de la evoluo de la nacio. Al tiuj ni konsilas, ke antaŭ ĉio ili klare observu la diferencon inter homo k bruto. Se homoj nur timas ke por la ekstermo de la bruteco estas tute ekster la kapablo, tio signifas nenion alian ol la degradigon de la homaro!

—Ĉefartikolo de plej malnova ĉina tagjurnalo "Sun Pao", antaŭe eldonata en Ŝanhajo sed pro la interveno de japana armeo, nun translokigita en Hankow. La artikolo datis 3an de marto.

Esperantigis: E. TIBU

adiaŭintoj estas larĝa rideto sur ŝia veteron-elportinta, profunde sulkiĝinta vizaĝo. Ŝi tutkore gajis pri la sukceso en ŝia grava misio, kio sendis ŝin al tiu ĉi urbo centojn da kilometroj fore de la montaro ĉe la Hopej-Ĉahar-Ŝansi landlimoj, kie ŝiaj bravuloj embuskas por ĉesigi la komunikadon de japanoj aŭ forbalai la izolitajn antaŭpostenojn.

Edzino de iam bonhava manĉuria farmisto nomata Ĉao, tiu virino, preferas esti konata per ŝia fraŭlina nomo Fan Ven Kŭo. Akraj lecionoj de fremda subpremado atribuitaj de japanaj trupoj elbakis el ŝi fervoran patriotinon. Ŝi ĵurpromesis venĝi al la japanoj, kiuj forrabi ĉiujn terpecojn de ŝia edzo.

## "Bandito" en 1933

En 1933, du jaroj post la japana militokupo de Manĉurio, ŝi, ŝia edzo k iliaj ok filinoj k unu filo fariĝis volontuloj aŭ banditoj en japana terminaro. Du jaroj de sinkaŝado k suferado por eskapi de la japanaj patroloj en norda Kirin provinco spertigis la anojn de la familio je supera pafado.

Ĉirkaŭ antaŭ 18 monatoj, pro la energia persekutado de japanoj ili forlasis Manĉurion k sin instalas en Vei-sien ĉe Ŝansi-Ĉahar landlimoj. Apenaŭ ili rikoltis por tri fojoj tie, la Ĉaoj estis devigataj cedi ĉiujn siajn posedaĵojn kiam la japanaj trupoj ankoraŭfoje ekmarŝis lastan julion.

Ĉe familia interkonsento, ili decidis venĝi siajn posedaĵojn k fariĝis ĉiuj regulaj gverilaj batalantoj. La patrino estas talenta organizanto. De vilaĝo al vilaĝo ŝi vojaĝis, prediktanta reziston inter la simile elturmentitaj farmistoj. Baldaŭ ŝi svarmigis la aligantojn. Rilate al fusiloj k kartoĉoj, ŝi akiris tute senĝene. Tra la implika sistemo de spionado, ŝi ĉiam sciigis kie troviĝas la solecaj gar izonoj k ordonis siajn homojn oferi al ili "ĝentilan viziton". Ofte la atakantoj revenis kun fusiloj por siaj rekrutaj anoj k municio abunda.

Iufoje, kiam ŝi disvastigis la evangeliion al amasa rezistado en iu kampa urbeto en norda Ŝansi, la tieaj farmistoj pensis ke ŝi estis blufanta, k rikane ŝin demandis: "Maljunulino vi estas, kion vi scias pri la gverila milito?"

## "Lerta Pafistino"

Anstataŭ diskuti, ŝi aludis ilin ŝin sekvi. Grimpinte sur iun monteton, ili ekvidis tri surseligaftajn patrolanojn japanajn siluetantajn kontraŭ la vesperiganta ĉielo. De sub ŝia jupo, ŝi eltiris Mauser pistolon. Ŝi alcelis. Ban! Ban! Du el la rajdistoj renversigis de sur la seloj k la tria fugis galope.

Nure el tiu ĉi urbeto pli ol 200 fortaj farmistoj aliĝis al ŝia trupo. La bataleja komandanto estas ŝia filo Ĉao Tun, kiu gvidis plejfoje en la brilaj rab-atakoj kontraŭ la invadantoj, ĉar ŝi opinias ke ŝi estas pli utila por agiti la vilaĝanojn k organizi ilin en la armeon de ŝia filo.

Dum ŝia lasta pasloĝo en Hankow, ŝi estis invitita ĉeesti iun diskutan kunsidon arangita de lokaj virinoj. Ŝi aŭskultis la parolojn tro multe. Finfine, ŝia pacienco estis plene elĉerpita. Eksaltante ŝi kriis:

## Tro Multe "Walla-Walla"!

"Plejparte el vi jam tutsciis pro kio Ĉinio batalas kontraŭ Japanio. Babili pri tio ĉiloke ne plu necesas. Sed en la vilaĝoj, la homoj ankoraŭ vualigas de la realeco. Kial vi ne iras tien k klarigas al la farmistoj anstataŭ ĉi-tiaj "walla" (Brua Babilado) en la komforte mebligita ĉambro?"


Ŝi deziras agadi k agi multe. Dum la lastaj tri-kvar monatoj, la patriota misio pelis ŝin al ĉiuj vilaĝoj ĉe Ŝansi-Ĉahar-Hopej landlimoj. Ĉie ajn ŝi paroli kun la vilaĝanoj k instigis ilin sin levi kun armiloj kontraŭ la japanoj. Ĉefe pro ŝia energia penado k infekta patriotismo, ŝia filo Ĉao Tun fariĝas nun la komandanto de la ĉiam kreskiĝanta armeo de 20,000 misteraj batalantoj.

Ŝi estas amike nomata de ŝiaj soldatoj kiel "patrino de la Armeo". Tiu 58-jara virino la societajn aferojn tute ne ŝatas. Kiam ŝi estis en Hankow, ŝi indiferece malakceptis ĉiujn invitojn al festenoj. En la tago de ŝia foriro, oni sendis aŭtomobilon al ŝia loĝejo.

"Kio, aŭtomobilo! Nur imagu, kion miaj homoj parolos, se ili eksciis ke mi veturas en aŭtomobilo? Ili eĉ pensus ke mi fariĝas riĉulo k forgesos iliajn malfacilojn en batalo kontraŭ japanoj sur la frostegaj nordaj frontoj."

Ŝi iris per piedoj al la stacio de ŝi loĝejo.

—E. Tibu



## Surstrata Dramo

estas vaste uzata rimedo por vekti k informi la popolamasojn pri la invadismo k barbarismo de japana imperiismo. La bildo montras prezentadon de tia dramo ludatan de ĉinaj gejnuloj sur vilaĝa placo ĉirkaŭrigardatan de soldatoj k kamparanoj. Amuzo, eduko k batalo unuiĝas en la prezentado (La Popola Informo Servo)



# La Juna Generacio En La Milito

E. T.

En ĉi foja ŝanhaja milito, ĉinoj ĉiuklasaj montras al ni sian moralan k spiritan valoron.

Dum tiu ĉi urbego estas forte skuata de milito k kaoso, la problemoj pri rifuĝantoj, nutraĵoj k multaj aliaj tre ĝenas la lokan registaron. Masoj da volontuloj, per siaj entuziasmaj k energiaj laboroj, dediĉas al la malfeliĉaj homoj grandan servon. Inter tiaj heroaj sindonoj, ni ne neglektu tiun de la juna generacio!

Dekiam la eksplodo de Ĉin-japana milito en Ŝanhajo, tuj mobilizigas 1,500 geknaboj por servi al sia patrolando. Tiuj estas ĉinaj skoltoj, ĉiuj ne superas la aĝon de 16-jaroj.

Ili laboras ofte en tre danĝeraj lokoj, kie konstante okazas la bombardoj de japanoj. Kie troviĝas katastrofo, tie estas la skoltoj, servantaj en la mizera cirkonstanco, al tiu eĉ la maturuloj timiĝas k retiriĝas. Ili helpas k flegas senlace la vunditojn k observas la ordon kun alta fervoro.

Ilia patriotismo estas nemezureblaj. Du trionoj el la skoltoj servas en la hospitaloj po 12 horoj ĉiutage. La laboroj estas malfacilaj, same kiel ĉe aliaj fakoj de la militaj servolaboroj. Ili dormas en la deĵorejo, sed mangas hejme. Ĉiuj moneroj kolektitaj estas tuj transdonitaj al la bonfaraj organizoj. Ili disponas nenion por si. Eĉ la uniformo estas preparita per ilia propra mono. Ili laboras por ĉiuj, sed estas rekompencitaj de neniu.

Tiuj 1500 geknaboj estas organizitaj sub la gvido de S-ro Su, k starigas kvin fakojn en si por zorgi pri disciplini, organizi, provizi, propagandi k interrilati.

Ilia oficejo lokiĝas en Hai Fun Knabina Liceo ĉe Rue d'Avenue de franca koncesio, sed la anoj dise troviĝas tra la tuta distrkto. Ili posedas 4 motorbiciklojn, 2 aŭtomobilojn k ĉirkaŭ 100 biciklojn kiel komunikilojn. Cetere, ili ankaŭ havas kelkajn ŝarĝvagonojn depruntitajn de aliaj organizoj. En Ŝanhajo, ĉiuj organizoj samcelaj povas peti al ili por helpo. La skoltoj ankaŭ oficiale sciigis la gvidantojn de la internacia k franca koncesioj, ke ili volonte servas en tiuj distriktoj laŭbezono.

Sur la stratoj de Ŝanhajo, inter la indignantaj popoloj, ofte tondras la voĉo "bati la perfidulon", kel foje ĉe miskompreno sen ulpaj homoj povas ricevi senkompatan atakon. En tia okazo, nur la skoltoj povas efike pacigi la amaĵojn k solvi ĉiujn malfacilojn.

Multaj rifuĝantoj, feliĉe revenintaj al siaj hejmoj, nepre dankas al la skoltoj tutkore, ĉar sufiĉe da kontribuaj estas jam kolektitaj de skoltoj por sendi la rifuĝantojn en la sendanĝerajn zonojn. Ankaŭ multaj familioj, kies anoj apartiĝis unu de la aliaj en la milito k rekuniĝis poste dank' al la helpo de la skoltoj, neniam forgesos ilin.

Tiuj skoltoj ankaŭ esprimas sian esperon por servi sur la frontoj, sed tio ne realiĝas nur pro la fakto ke al ili

mankas la necesan militedukadon.

Ni sciis bone, ke dum la ŝanhaja milito en 1932a, ĉinaj skoltoj iam instalas telefonajn komunikilojn por la armeo en la frontoj, riparas la urba-murojn de Suĉoŭ, k kune kun la soldatoj konstruis vojon de pli ol 30 kilometroj de Kŭansan ĝis Suĉoŭ. La skoltoj ankaŭ helpis ĉiukaze al la soldatoj kiam tiuj translokiĝis. Kelkfoje la skoltoj eĉ militis kontraŭ la invadintoj kun la soldatoj ŝultro-al-ŝultre. Kiel tiaj heroaĵoj allogas la junulajn korojn de nunaj skoltoj.

Unu el la skoltoj tamen decidiĝis sian vivon kiam kun kelkaj aliaj ili laboras por la rifuĝantoj ĉe la angulo de Rue d'Avenue k Ju Ja Cin Stratoj en Ŝanhajo, kredinde li estas la unua martiro en Ĉinio de sia klaso!

## - el angla-lingva taggazeto "Post and Mercury"

Ta Kung Pao, ŝatata tag-jurnalo en Ĉinio, informis pri alia historio de la skoltoj. La historio estas kortuŝa kaj legiĝas jene:-

"Kiam iu trupo retiriĝis el la urbo Kŭansan, forgesis doni informon al tri nematurulojn, tiuj estas skoltoj, kiuj servas tiam en la armeo. Kvankam ili estis forgesitaj, tamen ne revenis hejmen. Al ĉiuj homoj, grupoj renkontitaj ili demandis pri la iam servita trupo. Ili triope postkuris per piedoj la trupon kiam informon ili ricevis. Dumvoje unu el ili mortis bombardite de la japana aeroplano k alia vundigis samkaŭze, la tria, nur 15 jaraĝa, per manoj enterigis sian mortintan kunulon, k ŝultreportante la vunditon, decideme daŭrigis la vojaĝon por 25 kilometroj, tie li hazarde trovis ambulancan aŭtomobilon. Oni akceptis la vunditan sed la sanan ne enlasis. La 15-jar-aĝulo do iris ĝis Suĉoŭ piede, sed neniu lin akceptis tie, ĉar grandparto de la loĝantoj jam antaŭtempe forrifugiĝis. Vagonaro ankaŭ ne estis. Li plue iris al Vuŝi, tie lin renkontis la sama malfacilo kiel en Suĉoŭ. Fine, laŭ la fervojo li trenis sin ĝis la urbo Ĉanĉoŭ.

Unuope, senhelpe, li vagis tien k reen sur la plafono de la stacio, paciencie atendante la alvenon de iu vagonaro. Li decidis vojaĝi al Nankino por prezenti sin por plua servo ĉe la tiea ĝenerala administrejo de ĉinaj skoltoj. Tagojn pasis, la vagonaro ankoraŭ ne alvenis. Obstine en sia volo, li malcedeme atendis ĉe la stacio. Per sia nura mono de 20 cendojn li aĉetis maldelikatajn kukojn por sin satigi. En la nokto, li kuŝis sur la tera planko de iu forlasita kabano. Li estas la filo de iu prospera familio, tamen li ne volas retroiri en sian komfortan hejmon. Lia sola volo estas en ĉefurbo por sin turni al la skolta administrejo kaj ankoraŭfoje servi en la armeo. Al onia demando li respondis arde:

"Kvankam mi estas juna, sed ankaŭ devas labori por la nacio samkiel la maturuloj!"



Du Virinaj Soldatoj

## Ne forgesu nin!

Jen publika letero de Ŝanhajaj infanoj. Kvankam ĝi estas adresita al enlandaj infanamikoj, ni kredas, ke ankaŭ infanamikoj el aliaj landoj legos ĝin kun emocio.

-elĉinigiĝis Ĉ. Ĉen

Karaj tutlandaj infan-amikoj:

Ŝanhajo nun estas sub la huŝoj de japanj diabloj. Sub ilia kontrolado, niaj vivnecesaĵoj kiel rizo, brasiko, oleo ktp ne povas esti libere enportataj, prezo de ĉiuj varoj altiĝis, nia vivo fariĝis pli malfacila. Mutaj rifuĝintoj noktigitaj sur stratoj mortis de frosto aŭ de malsato.

Ni propraokule vidis la diablojn. Ili volis per tio minacis nin, subpremi nian kontraŭbatalon; ni ankaŭ aŭdis ke la diabloj armite arestis niajn kunfratojn en la Internacia Koncesio. La diabloj ankaŭ armite traserĉis niajn lernejojn. Tiujn suferojn de senpatriuloj ni neniam forgesos, ili nur plifortigas nian venĝemon!

Nun nia liberiga movado ne povas iradi glate. Tamen ni povas fariĝi infan-instruistoj, ni instruas al la senkleraj k analfabetaj infanoj por ke ili scipovu legi k konsci pri la senhomeco de la diabloj. Krome ni penas kolekti monon por la senhejmaj rifuĝintaj infanoj, kiuj nur havas du mangojn ĉiutage en rifuĝejoj kun limigita kvanto. Ili sidas sur la ŝtupoj de ŝtuparo por ricevi lecionojn, ĉar al ili mankas loko, tablo k seĝoj. Ili vestigas ĉifone, ilia vivo estas tre mizera. Multaj rifuĝintaj infanoj mortis de malsano. Laŭ enketo de la urba konsilantaro de Internacia Koncesio, en tuta Ŝanhajo ĉiutage mortas meznombro 3-400 rifuĝintaj infanoj. Pripensu, karaj amikoj, ĉu tio estas homa vivo? Kiu faris nin tia?

Karaj tutlandaj infanamikoj! Malgraŭ ke ni jam spertas la suferojn de senpatriuloj, ni tute ne perdis nian kuragon. Notu bone en via memoro ke ni neniam subigos, ni ne fariĝos hundaĉoj



C. MAR

## EN JAPANA POLICEJO

Dudekkvinan de junio, en frumatenon, kiam mi ĵus ellitiginte staras ĉe la fenestro por enspiri la freŝan aeron, ekaŭdiĝis frapado ĉe la pordo. Miaj gedommastroj ankoraŭ ronketis en siaj sonĝoj. Mi subiris en mia negliĝo kaj malriglis la pordon. Aperis du diketaj malaltuloj vestitaj en la europa kostumo. Unu min strabis malŝate, la alia mi demandis:

—Ĉu vi estas sro X?

La tono soniĝis natura, tute senembarsa; ŝajnas, ke li konis min jam de longa tempo.

—Jes, — mi respondis per la japana lingvo, — kiun vi volas vidi? La gemastroj estas ankoraŭ en la dormo.

Ili ne plu perolis. Kaj ne petante la permeson, ili entrudis sin kaj supreniris la ŝtuparon, rekte al mi ĉambro. Pli strange ili ekserĉis inter miaj aĵoj. kvazaŭ nervozaj ratoj serĉantaj mangaĵon en nutraĵrezervejo, disĵetante tien kaj ĉi-tien miajn librojn kaj skribaĵojn. Unu foliumis miajn librojn kaj ĵurnalojn, la alia ekzamenis la tirkestojn. Poste ili ĉashunde flaris en la niĉojn de la muroj, kie lau la japana kutimo, oni konservas la litaĵojn, kofrojn kaj kestojn. Kaj ili devigis min malŝlosi la vestkestojn kaj ekesploris ilin. Unu disvolvis miajn vestojn kiujn mi bone faldis, kaj kirligis siajn manojn en la poŝoj de la vestoj; la alia malkovris miajn inkujon, kestetojn por diversaj, ktp. La serĉado dauras preskau du horojn. Ili kolektis kune la fotalbumon, esperantajn librojn inkluzive vortarojn, ĵurnalojn en diversaj lingvoj. Ili prenis la aĵojn for. Ne sufiĉas. Ili devigis min iri kune.

—Kial kaj kien? — mi demandis surprizite.

—Al la policejo, ni estas polistoj sekretaj.

Nur tiam ili montris al mi iliajn atestkartojn kiel policistoj. Kaj ili ridetis sigifplene unu al la alia. La rideto estas iom akra, cinika kaj triumfa.

Oni kondukis min al la branĉoplicejo, ne malproksime de mia loĝejo. En

de la diabloj ĝis morto, ni ankoraŭ havas la firman volon "batali ĝis la fino". Tutlandaj infanaj kunfratoj! Ni ĉiuj leviĝul! Havu ni decidemon ke ni batalu por defendi la patrion, oferu nin por la suferoj de senpatriuloj!

Ni do esperas ke vi estu kuraĝaj, ke la tutlandaj infanoj armigu la malamikoj por reakiri la perditajn teritoriojn k forpeli la japanajn rabistojn el nia lando! Kun firme pugnigantaj manoj k forte kunpremitaj dentoj ni atendas k atendas.

La lasta frazo, kiun ni diras al vi kun larmoj:

"Ne forgesu nin!

Saluton!

Ŝanhajaj infanoj

### KORESPONDADO

K-do C. Mar, P. O. Box No 74, Hankow, China, volas korespondi kun belartistoj el ĉiuj landoj.

malgranda ĉambreto mi sidi Ĉe la pordo fumis la sekretaj policistoj, sen-vorte, jen turnante la vizaĝojn al la muroj kie pendigas kelkaj vergoj kaj batiloj, jen ĵetante rigardon al miaj libroj, leteroj, fotkolektoj kaj aliaĵoj senorde sternitaj sur la tablo. Mi tenis min trankvila kaj penis kiel eble ne perdi la humoron. Mi sciis bone, ke en tiu ĉi faŝista lando ne ekzistas la "homrajto", precipe por ni ĉinaj junuloj.

Post preskau duonhoro eniris rapideme dikventra malaltulo kun valizo sub la brako. Tiu ĉi malalta dikulo.....kiel mi lin priskribos? Lia korpo.....malalta, korpulenta kaj rondventra. Lia kapo.....tre interese, rondeta, iom simila al la formo de citrolo. Kelkaj kalkuleblaj, maldensaj haroj, helpe de la balma pomado, estis bele partigitaj en du partoj sur la ronda kapo; harmonie al ĉi estas paro da nigre densaj brovoj kaj unu granda, plata nazo.

Lia aspekto montras sin tre mallerta, sed li klopodis esti rapidmova kaj eĉ gracia, tiel ke li aspektu kiel kapabla revizoro. Kvazaŭ komisiplene li urgmaniere metis sian valizon sur la tablon. Kaj li spiregis por momento kaj ĵeti malŝate rigardon al mi kaj sidigis sin.

—Mensogro estas malpermesita.

Li ekalparolis min, en granda voĉo.

Mi sentis kuriozon, ne surprizon, Mi demandis en mi, ĉu tiu ĉi dikventrulo vere estos la inspektoro kaj venas por esplori min? Mi ne estas kulpa, mi ne rompis la japanan leĝon. Kia estas la afero? La sekretaj policistoj, precipe tiu ĉi grasa malaltulo, tiel serioze agas.

Dum mi rezonadis, la malaltulo ekrompis la silenton per lauta krio:

—Omae, ĉu vi audas?

"Omae" estas la plej malrespekta pronomo por "vi" en la japana lingvo, uzita de superulo al sklavo au servisto, nuntempe de edzo al la edzino. Mi sentis min tre indigna, ĉar mi ne estas ŝtelisto, nek seksperfortulo.

—Por kio vi perforte venigas min ĉi tie? — mi protestas. — Mi ne estas kulpa.

Audinte miajn vortojn, la malaltulo ekgravigis la vizaĝon, ŝovis jen supren, jen malsupren la brovojn kaj turnis kaj rondigis siajn malgrandajn okulojn. La aliaj du sekretaj poli istoj ĉashunde ekzamenantaj miajn aĵojn ankau levis siajn kapojn kaj malice okulfiksitis min.

—Omae.....

La malalta grasulo apenau povis fini la frazon pro troa kolerigo. Li ekstaris kaj ŝovis sian pugnitan, harozan manon al mi. Ĝi estas tremanta, la vejnoj saltas sub la haroza hauta. Vidante la scenon, mi ekmemoris, ke mi estas en la japana policejo kaj bonhumoro de ia speco trankviligis min.

—Nu, kion vi volas demandi? mi di is.

—Skribu klare al mi la nomojn kaj adresojn de viaj japanaj esp-amikoj.

Kiel mi skribi kaj por kio? Mi konas dekojn da japanaj esperantistoj. Pri iliaj nomoj kaj adresoj mi jam konfuziĝis. Tamen mi laumemore skribis kelkajn.

—Tio ne sufiĉas, omae, mensogulo!

Kaj li enmanigis bombustangon kaj montris ĝin al mi, sinjore fermante la buŝon, jugistmaniere kunstiris la densan brovparon. Mi preskau eksplodis en

ridego vidante la artfaritan mienon; tamen mi komprenis, kion signifas la stango.

—Por diri la veron, mi vere forgesis — mi milde diris.

—Ne povas esti! La ulo kun la nomo Taka.....

Jen li sugestis al mi la nomon. Nu, mi ja forgesis pri tiu nomo. Sub la akra rigardo de l' malaltulo mi cerbumis, cerbumis.....Fine mi ekmemoris, ke tio estas sinjoro xx, lingvisto kaj eksredaktoro de la gazeto *Esperanta Literatura*. Mi sekve skribis.

—Estas ankoraŭ aliaj.

—Jen ĉa tuto — mi diris, — mi diris la veron.

La malgranda grasulo ŝajnis kontenta. Li residigis sin kaj flanken metis la stangon.

—Omae

Li ekpauzis por momento. Li ŝovis cigaredon en la buŝon kaj ekfumis, duonfermante la okulojn. Post minuta e'blovado de la fumo, kiu majeste serpentumĉis en la aeron, tiu ĉi ma'ata grasulo ekrompis la silenton, supren levante siajn rondajn okulojn.

—Omae, le kie vi ricevis la monon por via movado? diru la veron.

La monon por la movado. Ki mono kaj kia movado? interesa tame malica demando. Mi neniam imagi, ke tiu mala'tulo e'ligi tian demandon. Mi ne estas partiano, nek ia politiku'o. (daurigota)

### LETERKESTO

S—Sir.

Vian leteron de 30/1 mi ricevis. Por komercaj ĉe'oj mi urĝe bezonas adresojn de viaj landanoj. Bonvo'u rapide ko'ekti diversajn adresarojn, ĵarlibrojn, nomarlibrojn de komercaj, industriaj, kulturaj k.a. instancoj kaj te'efonajn numeraribroj de diversaj urbegoj kaj urbetoj kie' eb'e plej mu'te (kompreneble ĉiuj kun adresoj.) Ĉion sendu lau la antaŭa adreso. D. Y.

O. O.

Ni dankas vin pro via letero. Ni kredas, ke vi faros ĉion ĉiam kun prudenta singardemo, por eviti eventualan ma agrablajon. Ĉ. S.

### ATENTU!!!

Provekzemplerojn ni jam sendis al niaj legantoj el a unua kaj dua numeroj. Sed ĉiuj scias ke ni ne povas daŭre liveri senpage. Tamen al esp-aj organizoj, kiuj petas per oficiala letero au karto ni sendos ankoraŭ senpage 6, sinsekvajn numerojn. Kaj a' unuopaj espistoj, se kiuj montras al ni aktivecon pri nia afero per a'sendo de sa ut'etero (prefere al ĉinaj so datoj au statu'oj, kiel Generalismo Ĉan Kaj-ŝek, Prezidanto Lin Sun k. a. pere de ni,) au per uti'igo de la materia'oj el nia gazeto, ni ankau sendos 3 insekvajn numerojn senpage.

Cetere per a sendo de sa ut'etero kaj uti'igo de niaj materia'oj vi ne nur havigos al vi tri senpagajn numerojn, sed pli grave vi mora'e subtenos a heroan bata'on de ĉina popo'o kaj bone influos esp-an movadon en nia lando! Per unu sola ŝtono vi trafos 3 birdojn! Do, ne perdu la tempon jam nu!

Specime'nan ekzemp'eron ni sendos al ĉiu petanto kel kutime.

Adm. de Voĉoj el Criento.

